

BONA ESPERO

Rundbrief für die Freunde, Förderer
und Mitglieder des Fördervereins
"Bona Espero" e. V.

Cirkulero por amikoj, subtenantoj kaj membroj
de la "Subtenanta Asocio de BE" e.V.



n-ro 25

Marto 1989

Ktoj: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60 Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO
Postgiro-Amt Dortmund, BLZ 440 100 46 Kto-nr. 2033 99-465



Don José, la bovgardisto,
malfermas por vi la
pordon!

Don José, der Kuhhirte,
öffnet für Sie das Tor!

"Bonvojaĝu mia kara, tenu ĝojon en
memor", kantas la infanoj de BE,
ĉifoje por adiaŭi min kaj mi kun-
kantas kiel ĉiam, kiam dum la pa-
sintaj kvar semajnoj forveturis aŭ
forrajdis vizitantoj. Io ĝenas en
la gorĝo, mi devas gluti kaj la
vortoj sonas iom obtuze. Mi tre
bonfartis en BE kaj ne volonte re-
flugas al nia vintre malseka konti-
nento Eŭropo. Sed tie ne nur atendas
la edzo kaj la tuta familio, ankaŭ
vi ĉiuj, scivolaj aŭdi kaj legi,
kion mi spertis dum tiu monato en
brazila somero.

"Via vizito estos ĉiaspeca rekordo,
neniam iu flugis al ni tra Toronto
pli-malpli la plej malproksima
itenero, ne konsiderante eble Ĉini-
on," skribis Ursula Grattapaglia
antaŭ mia ekflugo. Ju pli longdaŭra
des pli favora? Mi ne provis alter-
nativojn tra Hongkong aŭ Aŭstralio.
Eble tiaj ekzistas kaj eble la pa-
saĝeroj tiakaze ricevas monon an-
stataŭ pagi al la flugkompanioj.

"Gute Reise meine Liebe, froh sei die
Erinnerung," singen die Kinder von BE.
Diesmal singen sie zu meinem Abschied
und ich singe mit wie immer in den ver-
gangenen 4 Wochen, wenn Abfahrende
oder Wegreitende verabschiedet wurden.
Etwas stört im Hals, ich muß schlucken
und die Worte klingen seltsam gepreßt.
Ich habe mich sehr wohl gefühlt in BE
und ich fliege nicht gerne zurück in's
winterlich nasse Europa. Aber es war-
tet nicht nur der Ehemann und die ganze
Familie, sondern alle Freunde von BE
gespannt auf das, was ich in dem bra-
silianischen Sommermonat erlebt habe.

"Dein Besuch wird in allem ein Rekord,
zu uns ist noch nie einer über Toronto
geflogen, mehr oder weniger die längste
Verbindung, wenn man nicht gleich über
China fliegt," schrieb Ursula Gratta-
paglia vor meinem Abflug. Je länger der
Flug desto preisgünstiger? Ich habe
nicht die Möglichkeiten über Hongkong
oder Australien untersucht. Vielleicht
ist auch das möglich und man bekommt
von den Flugkompanien Geld zurück.

Por mi sufiĉis la 'favora flugo' Amsterdam-Schiphol - Toronto - Rio - Brasilia kaj laŭ la sama vojo reen. La netajn flughorojn tra 6 horzonoj kaj du reen al Rio (pro somera horŝanĝo) mi ne nombris. Post bonveniga saluto de Ursula, Edita, Neto, Marilda kaj Lucia de la avia-deja tegmento, mi havis tuj okazon ĝui la ĉefurban vivon de la bonesperanoj. Fakte Edita kaj Neto, 15 kaj 17jaraj, ne plu estas bonesperanoj. Ili hazarde en Brasilia renkontis Ursula-n kaj kunvenis por akcepti min. Tiel mi konatiĝis kun du tre ĉarmaj, bonedukitaj gefratoj, ekslernantoj de BE, kiuj nun vivas kun la patro. La demandon:

Ĉu vi estas tre laca? "mi respondis duonsincere: "Ne tro!" "Tiam ni eble hodiaŭ ankoraŭ vizitu Enivaldon da Silva, la direktoron de BE kaj eble ankaŭ Mario Garofalo, unu el la kaskontrolistoj. Ĉe li vi povas ankaŭ tuj saluti Frank Schubert, kiu estas mamente en la urbo. Kaj se eblas, ni survoje faru ankoraŭ kelkajn aĉetojn. Postmorgaŭ ni tiam ekos al Bona Espero.

Dum la du tagoj en la vastarea, modernega Brazilia, la bona VW-buseto, verve stirita de Ursula, certe veturis 200 km, aĉete, vizite - kelkfoje erarvoje! Kaj sabaton tagmeze, adiaŭinte Edita-n, Mario-n kaj Lia-n (dua kaskontrolistino de BE), ni fine ekis direkton Alto Paraiso. Nia ŝarĝaĵo: 6 sakoj da faruno, 5 kestoj da sapo, kestojn da tomatoj, papriko kaj karotoj, sakoj da cepoj kaj terpomoj, 6 pakajoj po 20 kg, alvenintaj el Eŭropo, vestaĵoj de la 7 kunvojaĝintoj kaj kiel kulmino: 2 grandaj speguloj!

Speguloj kun ajlorabato

"Almenaŭ unu grandan spegulon ni bezonus," pripensas Ursula laŭte. Ni ĵus preterpasas vicin da diversgrandaj speguloj, apogitaj ĉe longa tablo antaŭ tendo, ĉe la strat-rando. "Ni demandu, kiom ili kostas" La vendisto, proksimume 10jara knabo, diras ion. "Tro kosta," estas nia respondo. Iom post iom la prezo malaltiĝas, tiom, ke montriĝas eble aĉeti tuj du. Unu por la blanka domo, unu por la nova. Kiam la nego-co estas preskaŭ farita, venas el la tendo la patrino, por enspezi la monon. La enirejon de la tendo ornamas vendopretaj, alloge longaj ajloplektaĵoj. "Bone, ni aĉetos la 2 spegulojn, kondiĉe ke la rabato estos ŝnuro da ajlo!"

Mir hat der 'günstige' Flug von Amsterdam-Schiphol - Toronto - Rio Brasilia und der gleiche Weg zurück erreicht. Die tatsächlichen Flugstunden, plus 6 Zeitzone nach Kanada, minus 2 nach Rio und außerdem Winterzeit in Brasilia, habe ich nicht gezählt. Nach dem Begrüßungsruf von Ursula, Edita, Neto, Marilda und Lucia vom Flughafendach, nahm ich sofort am Hauptstadt-Tempo der Bonesperaner teil. Obwohl Edita und Neto eigentlich gar keine Bonesperaner mehr sind. Sie trafen nur zufällig Ursula in Brasilia und kamen dann mit um mich abzuholen. Und so lernte ich gleich ein sehr höfliches junges Geschwisterpaar als Exschüler von BE kennen, die jetzt wieder bei ihrem Vater leben können. Die Frage:

"Bist Du sehr müde?" beantworte ich nur halbhehrlich: Nicht sehr!" "Dann können wir heute noch Enivaldo da Silva, den Direktor von BE und Mario Garofalo, einer der Kassenprüfer, besuchen. Bei ihm kannst Du dann auch gleich Frank Schubert begrüßen, der im Augenblick in der Stadt ist. Und unterwegs können wir noch einige Einkäufe machen. Übermorgen fahren wir dann los nach Bona Espero. Während dieser 2 Tage ist der brave VW-Bus mit der bravourensen Chauffeurin Ursula sicher 200 km gefahren, um im großzügig gebauten, supermodernen Brasilia alle Besuche, Einkäufe und auch einige Umwege zu erledigen. Und Samstagmittag, nach dem Abschied von Edita, Mario und Lia, der zweiten Kassenprüferin von BE, fuhren wir dann los in Richtung Alto Paraiso = Hohes Paradies, beladen mit 6 Säcken Mehl, 5 Kartons Seife, einige Käse, Tomaten, Paprika, Möhren, Zwiebeln, Kartoffeln, mit 6 Paketen à 20 kg aus Europa, Utensilien von 7 Mitfahrenden und 'last not least': 2 großen Spiegeln!

Spiegel mit Knoblauchrabatt

"Wenigstens einen großen Spiegel brauchen wir," überlegt Ursula laut. Gerade sind wir an einer Reihe verschieden großer Spiegel vorbeigefahren, die am Straßenrand vor einem Zelt an einen langen Tisch gelehnt sind. "Wir wollen hören, wieviel sie kosten!" Der Verkäufer, ein etwa 10jähriger Junge, nennt eine Summe. "Zu teuer," beschließen wir. Nach und nach geht der Preis herunter, bis wir sogar zwei kaufen können. Einen für das weiße Haus und einen für das neue. Als der Handel perfekt ist, kommt Mutter aus dem Zelt.



Sie will das Geld einnehmen. Den Eingang des Zelttes zieren verlockend lange Knoblauchschnüre. "Gut, wir kaufen die beiden Spiegel, wenn wir eine Knoblauchschnur als Rabatt bekommen!"

Über Steine und durch tiefe Löcher erreichen Spiegel und Knoblauch heil Bona Espero. Das Malheur geschah beim Anbringen, aber der Riß ist kaum zu sehen. In einem der 6 Pakete aus Europa waren Mickymaus-Aufkleber, die geschickt den Bruch kaschieren. Jetzt kontrollieren nicht nur die

Trans ŝtonojn kaj tra truegoj speguloj kaj ajlo bone atingis Bonan-n Espero-n. La difekto okazis dum la muntado, sed ĝi estas apenaŭ videbla. En unu el la 6 pakajoj el Eŭropo estis MIKI-musaj-glubildoj, kiuj orname kaŝas la rompon. Ne nur la knabinoj ofte kontrolas la perfektan aspekton de bluzo aŭ ĉemizo, la frizaĵon aŭ la brilan purecon de la dentoj. La spegulo pendas apud la duŝejo-necesejo.

Mädchen öfter, ob Bluse oder Hemd einwandfrei aussehen, die Frisur ordentlich und die Zähne blendend weiß gebürstet sind. Ein Spiegel hängt neben der Duschtür.

Dimanĉo - vizitotago

Sonntag - Besuchertag

"Por morgaŭ la pano ankoraŭ sufiĉos se ne venos vizitantoj." Tion konstatinte Ursula estingas la lumon en la kuirejo. Estas sabatvespero, en la domo nur 4 plenkreskuloj; la lernejoj revenos nur meze de la semajno, post feriofino.

"Für morgen wird das Brot noch reicher wenn keine Besucher kommen." Mit dieser Feststellung löscht Ursula das Licht in der Küche. Es ist Samstagabend, im Haus sind nur vier Erwachsene. Die Schüler kommen erst Mitte der Woche, zum Ferienende zurück.

La unua vizitantino estas Dona Maria kun la eta Aleksander sur la brako kaj kesto da ovoj en la mano. La kokoj kaj anasoj de BE gastas ĉe ŝia kokinaro en la Pionira Domo, ĉ. 300 m for de la cetera domaro.

Die erste Besucherin ist Dona Maria mit dem kleinen Alexander auf dem Arm und einem Kasten Eier in der Hand. Die Hühner und Enten von BE sind zu Gast im Pionierhaus, fast 300 m weg von den übrigen Häusern. Da können sie in Ruhe ihre Eier legen und werden nicht von den zwei albernen Hunden und den 45 spielenden Kindern gestört. Nur brüten dürfen sie noch nicht.

Supre: Pionira Domo kun Familanoj de Dona Maria, lavistino en Bona Espero!

Oben: Das Pionierhaus und die Familie von Dona Maria, Waschfrau in BE

Malsupre: Ankaŭ la lago apartenas al la Pionira Domo

Unten: Auch der See gehört zum Pionierhaus



Tie ili povas trankvile eligi siajn ovojn, neĝenitaj de la du petolemaj hundoj kaj la 45 ludemaj infanoj. Nur kovi ili ne jam rajtas. "Devas esti almenaŭ 16 ovoj," decidis Dona Maria, alie ne valoras!" Ĉar nur 12, ni rajtas formanĝi ilin. Ŝi rakontas pri ceteraj 7 infanoj, pri bopatro kaj ĉagreno kun la najbara masonisto José, kiu loĝas vid-al-vid en etas domo kun filino Marilda kaj du filoj. "Li ĉiam prunteprenas kaj neniam redonas - cetere, Dona Ursula, ĉu vi povas prunti skatolon da oleo kaj iom da rizo al mi?" Nun alvenas ŝia edzo, bovĝardisto José, nudpiede, por ne malpurigi la plankon. Li venas el la ŝtalo. Li portas en granda kruĉo la ĉiutagan laktoprovizon kaj plendas, ke denove apogiĝema bovino rompis foston de la ŝtalo, eĉ cementan. Ĉiuvespere tranoktas la 40 bovoj en ŝtalo, kiu apenaŭ meritas tiun nomon. Proksime de la domoj ili estas sekuraj kontraŭ lupoj kaj leopardoj. Laŭdire eĉ serpentoj respektas tiun terenon. Post la matena melkado pelas Silvani, la 12 jara filo, la bovaron al foraj paŝtejoj, sidante sur sensela ĉevaleto.

"Ĉu vi bonvolas malfermi la pordegon?" Envenas Sidarta, eble 10jara knabo. Lia patro, la kuracisto el Alto Paraiso, venis aŭtomobile kun la tuta familio kaj atendas antaŭ la lasta, bone ŝlosita pordo. Ili kunportas skribilojn kaj kajerojn por la lernejo, ĉar ankaŭ kuracisto Vinolis lecionas al infanoj en la urbeto. En la vigla konversacio temis tial ĉefe pri lernejaj problemoj en Alto Paraiso, kaŭzitaj ne nur pro tro da infanoj, sed ankaŭ pro tro burokrataj malhelpoj el parto de la regiona registaro. Tiu diskuto en portugala lingvo migrigas miajn pensojn: Ĉu la pano sufiĉos?"

"Pli konvenis hodiaŭ akompani la fratinojn!" Tion diras junulo, aventure vestita kun spronoj, ŝnure fiksitaj ĉe gimnastikŝuoj. Nun ni vidas, ke kun li estas du aliaj junuloj kaj la knabinoj Alessān kaj Amanda, lernantinoj en BE. La familio loĝas pli ol 30 km for en regiono preskaŭ 600 metrojn pli malalta, en subtropika, ĝangaleca tereno. La patro mortis antaŭ nelonge. La patri-no restis kun aro da infanoj kaj provas vivteni sin bestbredante.

"Es müssen wenigstens 16 Eier sein," hat Dona Maria beschlossen. Und weil es nur 12 sind, dürfen wir sie essen. Sie erzählt von ihren anderen 7 Kindern, vom Schwiegervater und dem Ärgere mit Nachbar José, einem Namensvetter ihres Mannes. Er wohnt gegenüber in einem kleinen Haus, zusammen mit Tochter Marilda und den zwei Söhnen. "Er leiht sich immer alles mögliche und gibt es dann nicht zurück. Übrigens, Dona Ursula, können sie mir wohl eine Dose Oel und etwas Reis leihen?" Dann kommt ihr Mann, José II, mit nackten Füßen um den Boden nicht zu verschmutzen. Er kommt aus dem Stall. Er bringt die große Kanne mit der frischen Milch und beschwert sich, daß schon wieder eine anlehungsbedürftige Kuh einen Pfosten zerbrochen hat. Und der war sogar aus Zement! Jeden Abend übernachteten die 40 Rinder im Stall, der kaum noch diesen Namen verdient. Aber in der Nähe der Häuser sind sie sicher vor Wölfen und Leoparden. Angeblich halten sich sogar Schlangen zurück. Nach dem morgendlichen Melken treibt der 12jährige Silvani, auf ungesatteltem Pferd, die Herde auf die Weide.

"Würdet Ihr wohl das Tor aufschließen?" Ein etwa 10jähriger Junge, Sidarta, ist hereingekommen. Sein Vater ist Arzt in Alto Paraiso. Er hat seine ganze Familie im Auto und wartet vor dem letzten, gut verschlossenen Tor. Sie haben Papier und Schreibmaterial für die Schule mitgebracht. Dr. Vinolis gibt in seiner Freizeit Kindern in Alto Paraiso Unterricht. Die lebhafteste Unterhaltung dreht sich also hauptsächlich um Schulprobleme, verursacht nicht nur durch zu viele Kinder, sondern auch durch bürokratische Schwierigkeiten der örtlichen Instanzen. Bei dieser in portugiesisch geführten Diskussion gehen meine Gedanken in eine andere Richtung! Wird das Brot reichen?

"Es kam uns heute besser aus, die Mädchen zu bringen!" Das sagt ein abenteuerlich gekleideter junger Mann, an den Turnschuhen Sporen, mit Bindfäden befestigt. Wir gehen nach draussen und sehen, daß mit ihm noch zwei Jungen und die Mädchen Alessān und Amanda, Schülerinnen in BE, angeritten sind. Die Familie wohnt in einer mehr als 30 km weit gelegenen Senke, in der subtropisches Urwaldklima herrscht.

"Ĉifoje la leopardo kaptis nur 4 bovidojn", raportas Joaō. Ili portas kelkajn bananojn kaj sakon da maizospadikoj en la domon, donaco de la patrino. Kaj ili sidigas por trinki kafon kaj manĝi la lastan panon.

Mi iras en la kuirejon por baki novan kaj vespere ni manĝas maizokukojn, tre bongustajn. Jen la recepto: duona sako da freŝa maizo, spadikojn raspi kiel por terpomaj patkukoj. Aldoni ovojn, iom da salo kaj tritiko-farunon. Baki en mulde da oleo kaj - ne tro multe manĝi - alie ne sufiĉas por ĉiuj.

Tiu estis la 30a de Januaro 1989,
mia unua tago en BONA ESPERO

Der Vater starb kürzlich. Nun versuchen sich Mutter und Kinder mit Viehzucht durchzuschlagen. "Diesmal hat der Leopard nur 4 Kälber geholt," berichtet Joaō, der Älteste. Sie bringen Bananen und einen Sack Maiskolben in's Haus, Geschenke der Mutter. Und dann setzen sie sich hin, trinken Kaffee und essen das letzte Brot.

Ich gehe in die Küche um neues zu backen. Abends essen wir Maiskuchen, die wie Kartoffel-Reibplätzchen gebacken werden. Statt Kartoffeln reibt man frische Maiskolben. Aber nicht zuviel davon essen - sonst reicht es nicht für alle.

Das war der 30. Januar 1989,
mein erster Tag in BONA ESPERO

Pri kvarsemajna kunlaboro mi raportos, pli koncentrite, en la venonta informilo. Pri la sperto de ĉiu vizitanto, ke ne tuj oni glate integriĝas en la evidente bone funkciantan laborritmon de BE. Unuopuloj ĉiukaze pli facile adaptiĝas ol granda grupo, kiu kaŭzas kelkfoje problemojn de loĝigado kaj nutrado. Restadon en BE oni planu longdistance kaj nepre nur interkonsente kun la gvidantoj tie.

Über 4 Wochen Mitarbeit, dann aber konzentrierter, möchte ich im nächsten Rundbrief berichten. Die Erfahrung, daß es einige Zeit dauert, bis man als unterstützendes Rädchen im gutgeölten Uhrwerk BE mitwirken kann, haben schon viele Besucher vor mir gemacht. Ebenso die, daß ein Einzelner schneller zu integrieren ist, als eine größere Gruppe. Wichtig ist auf alle Fälle einen Aufenthalt in BE langfristig zu planen und mit der Leitung dort abzustimmen.

Nia jarĉefkunveno estos en Telgte-Westbevern. Ni proponas sabaton, la 9.9.89 kaj petas jam nun membrojn kaj subtenantojn rezervi tiun daton. Paralele okazos laborkunsido de la Esperanto-Naturamikoj.

Unsere diesjährige Jahreshauptversammlung ist für Samstag, den 9.9.89 in Telgte-Westbevern vorgesehen. Mitglieder und Freunde werden schon jetzt gebeten, diesen Termin freizuhalten. Paralell zu unserer Veranstaltung findet ein Treffen des Arbeitsausschusses der Esperanto-Naturfreunde hier statt.

Knabinoj enviciĝu!
Ek al la lernejo!

Alle Mädchen aufstellen!
Auf in die Schule!

Resp.:
Margret Brandenburg
Brinker Damm 24
D-4404 TELGTE



Förderverein "BONA ESPERO" e. V.

Gegründet am 24.03.1981

Eingetragen unter Gem V 1028 - Finanzamt Münster-Stadt

Kto: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60, Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO

Kto: Postgiroamt Dortmund, BLZ 400 100 46, Kto-nr. 2033-99-465

BONA ESPERO

Kassenbericht 1988

Beiträge, Spenden

Bankzinsen

Einnahmen

21.026,30

199,38

21.225,68 DM

kasraporto

kotizoj, donacoj

interezo

germanaj markoj

Ausgaben

Barzahlung an BE Brasilien

Bankgebühr

Kontogebühren PGA

Portokosten für Information,
Korrespondenz und Werbung

Paketgebühren für Sachspenden

Druckkosten, Fotokopien

Bürobedarf

8.000,00

0,30

19,00

205,00

630,20

88,08

14,65

8.957,23 DM

elspezoj

kontante al BE Brazilo

bankspezo

kontokotizoj postĝiraj

afranko por informo,
korespondado, varbado

ekspedkostoj por
pakajoj

preskostoj, fotokopioj

kontormaterialo

gm

Guthaben am 31. 12. 87

Guthaben am 31. 12. 88

Einnahmen %/ Ausgaben 1988

8.229,02

20.497,47

12.268,45 DM

kontostato 31.12.87

kontostato 31.12.88

en- %/ elspez. 1988

Telgte, den 26. 03. 1989

Christoph B. ...

Hinweis

Barzahlung an Bona Espero
im Januar 1989

5.000,00 US Dollar

atentigo

kontante al BE Brazilo
en januaro 1989